
# La NASKa Fasko

Ĵurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe la Universitato de Viktorio

lundon, la 7-an de Julio, 2014 • numero ok


## Kio okazos hodiaŭ?




- ★ **9 atm – 12:30 ptm**
  Kursoj
- ★ **2:30 – 3:00 ptm**
  **Student Union, Upper Lounge**
  Orlando RAOLA (prezidanto de Esperanto-USA) prezentos la laboron de sia organizaĵo.
- ★ **3:00 – 4:00 ptm**
  **Student Union, Upper Lounge**
  Hiroyuki rakontos pri la nuklea katastrofo en Fukushima, pro kio li decidis forlasi Japanujon, kaj poste kiel li rigardas Ĉinujon, kie li nun laboras profesie per Esperanto.
- ★ **4:00 – 5:00 ptm**
  **Student Union, Upper Lounge**
  Filipo gvidos interparolon: Kial vi interesiĝis pri Esperanto?
- ★ **7:00 ptm – 8:00 ptm**
  **Student Union, Upper Lounge**
  Diplomceremonio
- ★ **8:00 ptm – malfrue**
  **Student Union, Upper Lounge**
  Filmvespero!


*La NASKa Fasko*
**Redaktejo:** ĉambro 203
<nask.esperanto@gmail.com>

*La NASKa Fasko* estas ĉiutaga ĵurnalo de la kursaro.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 203, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.


# Esperanto en… *Spongebob?*




*de Amerie LOMMEN*

Antaŭ kelkaj tagoj, mi kaj mia samĉambranino veturis al la urbocentro de Viktorio kaj trovis tie vendejon de bildstrioj. Ĉar ni estas modernaj junulinoj, ni kompreneble devis eniri, kaj ni konversaciis kun la kasisto pri Esperanto. Li diris: "Ho, estas homo en la plej nova volumo de *Spongebob Squarepants Comics* kiu parolas Esperanton."

Se vi ne jam scias, *Spongebob Squarepants* estas tre populara televida programo por infanoj pri spongo kiu vivas sub la maro. Mi ofte spektis ĝin kiam mi estis infano, kaj ĝis nun novaj epizodoj estas farataj.

Kompreneble ni aĉetis tiun libron. Ĝi estas la dua parto de kvin-parta serio kaj temas pri la heroo "Mermaid Man" (Marvirin-viro) kaj lia batalo kun "Viro Reganto" (la ekzakta nomo en la libro), kiu estas *reganto* de malnova perdita urbo nomata "Urbo." Ĉiu Urboano parolas Esperanton, kaj Viro Reganto uzas multajn Esperantajn vortojn inter anglaj frazoj. Ĉe la fino de la historio estas paĝo kun vortoj kaj frazoj en Esperanto uzitaj en la libro kaj iliaj tradukoj en la angla.




Estas iom da Esperantaj eraroj en la libro. Ekzemple, oni diras "Fari vi paroli Esperanto?" anstataŭ "Ĉu vi parolas Esperanton?" Multaj aliaj eraroj temas pri la uzo de la u-finaĵo (oni preskaŭ ĉiam uzas "-i" kiam "-u" estus ĝusta).

## Dankmesaĝo

*de Gerry PHELAN*

Mi volas danki la tutan teamon kiu aranĝis la ĉi-jaran NASK. Ekde la komenco, Ellen estis grandega helpanto.

Mia informo en Aŭstralio estis ke NASK estas eble la plej bona kurso kiun oni povus partopreni. Mi ne estas malkontentigita.

La laboro kiun Ĵenja faris en la preparado estis grandega kaj la energia metodo de instruado kaj speciale ŝia atento al la problemoj de la gelernantoj estis modelaj. Alveninte, mi atendis post-bazan kurson, kaj ĝuste tia ĝi estis. En tiu bona etoso, ĉiuj povas lerni.

En la tuta afero ŝi havis la helpon, sperton kaj saĝon de Liĉjo.

La tuta afero estas vere laŭdinda.

# Kial vi interesiĝis pri Esperanto?



*de Filipo* DORCAS

*[Filipo gvidos interparolon je la 4-a ptm hodiaŭ por ekscii kial partoprenantoj de NASK unue interesiĝis pri Esperanto. Jen priskribo de la afero. –Red.]*

Kiel vic-prezidanto de Esperanto-USA, mi volas aŭdi de diversaj NASK-anoj pri kial ili havas intereson en Esperanto.

Se kelkaj konsentos prezenti tre mallongan historian aŭ klarigon, tio helpos ilin (aparte tiujn en la unuaj du niveloj) paroli, sed pli grave, mi volas ekscii la rakontojn.

Tio helpos la movadon en Usono. Ĉu ni starigu fakajn organizojn? Ĉi ni komunikiĝu pli inter la lokaj grupoj pri kiel prezenti al ne-esperantistoj? Ĉu ni raportu pri vojaĝoj pli ofte? Ĉu ni bezonas aliajn ilojn por helpi studi? Ktp, ktp. La komunikado preskaŭ ĉiam helpas nin, kaj preskaŭ neniam malhelpas nin.

# Fotiĝi kun aŭtenta eskimo

*de George* PARTLOW

Kiam temas pri la insularo de San Juan (kie okazis la fifama "Porkmilito"), ĉiam mi memoras mian karmemoran amikon Tadeo "Tad" FUJIOKA, kiu naskiĝis tie. Li estis t.n. "Nisei", t.e. filo de japanaj enmigrintoj al Usono, kiuj posedis farmbienon en la insularo. Dum la dua mondmilito oni arestis ĉiujn japandevenajn loĝantojn je la okcidenta marbordo, ĉu civitanojn ĉu ne, kaj sendis ilin al malliberejoj en dezertaj regionoj. El tia loko Tad kiel junulo volontulis por la usona armeo, kaj li fariĝis unu el tiuj herooj de la batalo de Monte Cassino, pri kiu vi eble aŭdis aŭ legis.

Li aktivis en la anglikana kongregacio kie mi estis dum sep jaroj la orgenisto. Iam li estis tondetanta la rozarbustojn apud la preĝejo, kiam alproksimiĝis grego da turistoj. Li estis vestita, kiel kutime, en parte malorda kaj iom malpura laborvestaĵo de ordinara alaska fiŝkaptisto. Iom hezite, iu el la turistoj petis de li, "Ĉu ni rajtas fotografiĝi kun vi?" Li ne komprenis precize, kial oni deziras fari tion, sed afable konsentis. Post pluraj fotoj la turistoj pluiris, sed unu el la virinoj restis dum momento kaj plenkore dankis al li, dirante: "Ni simple NE povus reiri hejmen al Iowa sen havi foton de vera eskimo!"



Kia granda kaj ridetema grupo! Multan dankon al ĉiuj, kiuj partoprenis ĉi-jare! Se oni volas koloran kopion de tiu foto, Hoss baldaŭ afiŝos ĝin en la NASK-paĝoj en Facebook kaj Google+, kaj kompreneble li feliĉe sendos ĝin per retpoŝto, se oni preferas.

# Florido: mia hejmloko

*de Mark* ENGELBERG

Mi diru rekte kaj klare: mi ne ŝatas mian hejmlokon. Aliaj eble memoras sian hejmlokon kun varmaj sentoj. Ne mi.

Mi kreskis en Florido, la plej enuiga loko en la mondo. Ekzemple, la tero en Florido estas tute ebena. Fakte, la plej alta loko en Florido estas la rubejo, monteto kie kamionoj iras kaj venas por forĵeti rubaĵojn.

La vetero neniam ŝanĝiĝas en Florido. Oni diras, ke Florido havas nur unu sezonon: varmegon. Florido havas nur unu specon de arbo: palmon. Kien ajn oni rigardas, oni vidas palmojn.


Vere, Florido estas la plej enuiga loko en la mondo. Emeritoj transloĝiĝas tien, kiam iliaj koroj ne plu toleras ekscitiĝojn kaj kio ajn interesa donus al ili nur ŝokon. Tiom enuiga loko estas Florido.

La nomo de mia hejmurbo estas Korala Fonto. Sed tie estas nek koralo nek fonto. Ni loĝis apud strato nomata Riverbordo. Sed ankaŭ tie ne estas rivero, do nek riverbordo. Verŝajne tiujn nomojn oni kreis nur por trompi homojn. Fakte la tiel nomata Korala Fonto estas simpla marĉo. Serioze, kiel infano mi ne povis ludi sur la gazono sen risko esti manĝata de aligatoroj kaj mordata de serpentoj.

Iuj homoj venas al Florido por viziti belajn strandojn. Ankaŭ pri tio mi estis tre malbonŝanca. Ĉiufoje kiam mi vizitis strandon, min pikis meduzoj aŭ rajoj. Kaj tio okazis ĉiufoje!

Do, mi ne ŝatas Floridon, mian hejmlokon.

Mi povas diri unu pozitivan aferon pri Florido. Dankinde, post ducent jaroj la ŝtato estos sub la maro pro la tergloba varmiĝo. Hura!



Ĉu vi maltrafis pasintajn numerojn de la *Fasko?* Ĉiuj estas haveblaj en nia ret-arĥivo:
**http://nask.esperantic.org/jxurnalo**